

En Olomouc renkontiĝis blindaj esperantistoj el Eŭropo kaj Japanio

En Olomouc, CZ estis aranĝita en la tagoj de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2011 Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

La vicnumero de la **kongreso** estas 77 kaj estas tio triafoje, kiam ĝi estis aranĝita sur la ĉeĥa teritorio. De tiu ĉi internacia aranĝo partoprenis entute 56 gastoj el 12 landoj (Ĉeĥio, Bulgario, Finnlando, Italio, Germanio, Kroatio, Pollando, Serbio, Aŭstrio, Rusio kaj Japanio)

La patronecon super la kongreso transprenis vicestrino de la Regiona ofico de Regiono Olomouc Mgr. Yvona Kubjátová kaj ĉefurbestro de statuta urbo Olomouc sinjoro Martin Novotný. La kongreson signife subtenis Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj de malfortevidantoj de Ĉeĥa respubliko, Distrikto Olomouc, Teknika muzeo en Brno, Veolia transport Morava, Hotel Sigma Olomouc, eldonejo Kava-Pech Dobřichovice, Biblioteko kaj presejo por blinduloj Praha, Urbtrafika entrepreno de urbo Olomouc kaj TyfloCentrum Olomouc.

Organizanto de la kongreso estis Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto - Asocio

En hotelo Sigma okazis krom oficiala inaŭguro kaj solena fermo de la kongreso ankaŭ multaj neformalaj renkontoj de partoprenantoj, diverstemaj prelegoj inkluzive de tiu kongrestema: Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj, kaj du ĝeneralaj asembleoj de internacia organizacio de blindaj esperantistoj (LIBE).

Kongresa programo enhavis vicon da vizitoj de historiaj memorindaĵoj de urbo Olomouc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Krom aliaj tio estis vizito de historia urbodomo kaj centro de urbo Olomouc, katedralo de sankta Venceslao kaj de ĉefdioceza muzeo, baziliko kaj ZOO en Svatý Kopeček, monaĥeja fortikaĵo Klášterní Hradisko, historia armea fortikaĵo en Křelov kaj sankta meso en Esperanto en preĝejo de sankta Miĥaelo.

Partoprenantoj vizitis ankaŭ bierfarejon Moritz kaj ĉasistan kabanon en Horka nad Moravou. Unu tago estis dediĉita al prelego pri Karel Emanuel Macan, nestoro de E-movado de blinduloj new nur en nia lando, sed ankaŭ en la mondo. La prelego okazis en Teknika muzeo en Brno.

Estis vizitita ankaŭ centro por helpo al blinduloj en la strato I.P.Pavlova en Olomouc. Partoprenantoj ĉi tie ricevis informojn pri nivelo de subtenado de blindaj kaj malfortevidantaj homoj dum laborserĉado en distrikto Olomouc. Estis vizitebla ankaŭ vendejo de helpiloj, kiujn multaj partoprenantoj ne nur observis, sed ankaŭ aĉetis.

Celo de kongreso estis antaŭ ĉio interŝanĝo de ekkonoj pri nivelo de flego pri blindaj kaj malfortevidantaj homoj en diversaj landoj, per ekipo de kompetentaj helpiloj kaj pri forigado de barieroj.

Partoprenantoj renkontiĝis kun siaj konatuloj el pasintaj kongresoj kaj ankaŭ trovis novajn kontaktojn kaj novajn amikecojn. En nelasta vico ili havis eblecon pliperfektigi en uzado de Esperanto, kiu estas tradicia komunikilo por blinduloj de la tuta mondo jam pli longe ol 100 jarojn.

Ni estimas ĉiujn institutojn kaj organizaĵojn, kiuj finance aŭ per alia maniero subtenis tiun ĉi internacian renkontiĝon. Ĝi estis sendube sukcesa kaj per sia ekkona programo certe helpis al prezentado de urbo kaj regiono Olomouc eksterlande.

Jan Příborský, Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto - Asocio